

Okdek jaroj de esperanta vivo, 10-a parto
La reformita dialekto
Claude Gacond, 188-a radioprelego, 1967.05.17 & 1967.05.20

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Fonetike kaj strukture la reformita dialekto submetita de Zamenhof al la voĉdono de la abonantoj de *La Esperantisto* estis multe malpli nuancita, ol la klasika esperanto.

A.- Esperanto estas frukto de longa meditado pri la lingva fenomeno.

Cl.- La reformita projekto de 1894 kontraŭe estas frukto de provo akordigi neakordigeblaĵojn.

A.- Verkante sian projekton pri reformo Zamenhof devis atenti argumentojn, kiuj por li fontis el la subjektiveco de teoriemuloj.

Cl.- La Lingvo internacia de 1887 estas internacia pro sia kapablo respeguli kiel eble plej precize la lingvo-fenomenon mem.

A.- La projekto de 1894 respegulas la dezirojn de la komencantoj, la kritikojn de la eksteruloj, la spirito-staton de la reformemaj esperantistoj.

Cl.- Ĉar la komencantoj tiam ellernis la lingvon ĉefe per libro, la propagandistoj sentis la bezonon forigi la sonojn, kiuj ne troviĝas en la gravaj eŭropaj lingvoj. Ĉar la germanoj malfacile distingis la sonojn **so** kaj **zo**, por obei al la mecenato Trompeter Zamenhof proponas la forigon de la sono **zo**. Tiel ne plu estos erare diri **zed** anstataŭ **sed**, kaj la germanoj tute libere povos diri *Zinjoro Zommer zalutas zinjinon Zaĝa* anstataŭ sin devigi prononci *Sinjoro Sommer salutas sinjinon Saĝa*.

A.- Por plaĉi al la propagandistoj Zamenhof akceptas forferi la fonetikan unuecon de la lingvo. Jen alia ekzemplo. La rusoj tendencas akre elparoli la sonon **ho**. Do por ilin helpi oni forigu la sonon **ĥo** kaj permesu diri *ĥomo, ĥavi, ĥela* anstataŭ *homo, havi, hela*.

Cl.- Tiuj subjektivaj konsideroj, anstataŭ konduki al la plibonigo de la instruteknikoj, kondukis al la forigo de 7 sonoj, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni tre facile lerneblaj. Ili estas reprezentataj per la esperantaj literoj **ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ĵ, ŭ** kaj **z**. Jen granda malriĉiĝo nur por kontentigi komencantojn, kiuj estas nekapablaj sin submeti al la fonetiko de fremda lingvo !

A.- Jen kiel sin prezentas la alfabeto de la reformita dialekto :

Cl.- A B C (prononcata ŝo) D E F G H (prononcata ho aŭ ĥo) I (prononcata i aŭ jo) K L M N O P R S (prononcata so aŭ zo) T U (prononcata u aŭ ŭo) V Z (prononcata co).

A.- Vi certe emas aŭdi tekston en tiu dialekto. Jen do la kristana preĝo **Patro Nia** :

Cl.- *Patro nue, kvu esten en cielo (ŝielo), sankte (sankte aŭ zankte) estan tue nomo, venan regito tue, estan volo tue kom in cielo anku sur (sur aŭ zur) tero. Pano nue omniedie donan al nu hodi (hodi aŭ ĥodi) e pardonan al nu debi nue kom nu anku pardonan al nue debenti, ne kondukan nu in tento sed (sed aŭ zed) liberigan nu de malbono.*

A.- Kiel vi konstatis, tiu nova malpli nuancita fonetiko trudas multajn ŝanĝojn de radikoj. Helpe de kelkaj tradukoj ni donos al vi pli precizan ideon pri la aspekto de la proponita dialekto. *Mi aĉetas pomojn fariĝas* :

Cl.- *Mu kompren pomi.*

A.- *Li manĝis panon kaj buteron :*

Cl.- *Lu edin pano e butro.*

A.- *Ŝi anoncas sian alvenon :*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 10-a parto
La reformita dialekto
Claude Gacond, 188-a radioprelego, 1967.05.17 & 1967.05.20

Cl.- *Elu anonzen (anoncen) su alveno.*

A.- *Ni aŭskultos la rakonton:*

Cl.- *Nu askulton rakonto.*

A.- *Se vi havus paciencon, vi aŭdus la birdon kanti :*

Cl.- *Se vu havun patienzo (patienco), vu entendun ukcelo (ukŝelo) kanta.*

A.- *Viaj infanoj rapide komprenas ĉion.*

Cl.- Por traduki tiun frazon oni devas ŝanĝi la vortordon pro tio, ke la adjektivoj kaj la adverboj ricevas la saman markon **e**. La frazo *Vue infanti rapide komprenen omno* riskus signifi por multaj aŭdantoj *Viaj rapidaj infanoj komprenas ĉion*, do jen la sola bona traduko : *Vue infanti komprenen rapide omno*.

A.- Tiu konfuzo inter la adverboj kaj adjektivoj volis kontentigi la germanojn, kie **gut** signifas ĉu **bona**, ĉu **bone**. La forigo de la akuzativo celis ĉesigi la kritikojn de la francoj, la malaperigo de la artikolo volis agrabligi la lernadon de esperanto al la slavoj. Por plaĉi al la angloj la adjektivoj restas senŝanĝaj. Nur la nomo ricevas la markon de la pluralo per la litero **i**, kiu anstataŭas la literon **o**.

Cl.- Tiuj simpligoj aŭtomate kreas komplikigojn. Kiel en la franca la subjekto devas troviĝi antaŭ la verbo kaj la objekta komplemento post la verbo, tio por eviti konfuzojn.

A.- La lingvo stile fariĝas pli rigida kaj malpli konvenas al la tradukarto, ĉefe al la poezia tradukado. Ni pensu al la bela verso de la zamenhofa poemo *Mia penso « Fajron sentas mi interne »*, kie la akuzativo antaŭas la verbon. Estas neeble traduki tiun version sen ŝanĝi la vortordon, ĉar :

Cl.- *« Fuoko senten mu interne »* signifus:

A.- „*Fajro sentas min interne*“, kio havus tute alian signifon.

Cl.- Nur ĉerpante el la poemoj de Zamenhof ni povus trovi plurajn dekojn da tiaj ekzemploj. La strukturo de la dialekto malhelpas la versfaradon. Kontraŭe la strukturo de la klasika esperanto favoras poeziomadon.

A.- Tion bone sentis la abonantoj de *La Esperantisto*. Pro tio inter la 264 personoj, kiuj esprimis sian vidpunkton nur 11 poris tiun reformon, 157 abonantoj (la tri kvinonoj de la voĉintoj) rifuzis ĉian reformon.

Cl.- Zamenhof, kiu estis skribinta en siaj artikoloj proponantaj la reformon :

A.- *« Se la afero dependus de mi, mi retenus ankoraŭ ĉiujn parolojn pri reformoj, sed ĉar mi ne povas kontraŭstari al la fluo de flanko pli potenca, mi volonte provos gvidi ĝin, por depreni de ĝi la danĝerecon kaj turni la malbonon al bono. »*

Cl.- Zamenhof certe ĝojegis, kiam li konstatis, ke la esperantistaro sin prononcis por la lingva stabileco. Por la unua fojo en la historio de esperanto oficiala verdikto esprimis la deziron de la esperantistoj.

A.- La reformemuloj komprenis la gravecon de tiu voĉdono. Se, antaŭ ol ekzistas grava literaturo kaj financaj interesoj, la esperantistoj jam estas kontraŭ ĉia lingva reformo, estontece neniam ili akceptos fundamentan reformon.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 10-a parto
La reformita dialekto
Claude Gacond, 188-a radioprelego, 1967.05.17 & 1967.05.20

Cl.- Tial la reformema skolo do forlasis la esperantan movadon, por aliĝi al la skolo, kiu provis reformi la lingvon de Schleyer. La lingvaj disputoj okazos ekde 1894 ekster nia movado. De tempo al tempo ili influos la disvolviĝon de nia lingvo. Sed neniam ili kapablos atenci kontraŭ la internan dinamismon propra al esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-